

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

9-a jarkolekto

N-ro 3, 1979

Edistudio, Pizo, Italujo

ENHAVO

a. ĝeneralaj artikoloj. <i>Helmut Sonnabend — La internacia jaro de la infano</i>	53
b. fakmetodaj kaj didaktikaj traktaĵoj. <i>Resumoj el la 13a Konferenco en Lokarno</i>	59
c. la korekta lingvo. <i>Jen mikrobiblioteka legendo</i>	69
ĉ. rekomenditaj libroj. <i>István Szerdahelyi — Neŭtrala verko de neŭtrala Ligo</i>	71
d. estraraj informoj de Ilei. <i>14a Konferenco en Malto</i>	74
<i>Statistiko 1979</i>	75
e. dokumentoj. <i>Rilatoj inter Malagasio kaj Ilei</i>	77
<i>Hans Fehler — Opinio kaj propono</i>	80
suplemento <i>Komuna resumaro de sciencaj revuoj 1979: 1-2</i>	I-VIII

A. ĜENERALAJ ARTIKOLOJ.

La internacia jaro de la infano

Helmut Sonnabend

En tiu ĉi jaro certe okazas multe da aranĝoj dediĉitaj al infanoj.

Jen registaroj organizas publikajn kunvenojn en grandaj haloj kun porinfanaj programoj, jen la publikaj medioj kiel televido montras diversajn problemojn el la vivo de infanoj; oni aranĝas intervjuojn kaj enketojn demandante la infanojn kiel ili mem prijuĝas la propran situacion: estas tuta skalo da eventoj, kaj prezentadoj por iom direkti la pensojn de la plenkreskuloj al la aparta rolo de la infano.

Neniu estas inter ni al kiu la infana vivo estas fremda.

Kiu ne havas rememorojn pri sia infaneco, pri travivaĵoj?

Ili certe estas multflankaj, diverĝaj, diversaj kaj ne unuecaj. Jen estas multaj, kiuj jam frue devis sperti la luktadon akiri la necesajn vivrimedojn, jen estas pluraj kiuj estas perdintaj tre frue la gepatrojn, aliaj travivis harmonian infanecon. La mozaika skalo kompreneble estas multe pli buntkolora. Sed ĉiuj diversaj infanaj sortoj posedas unu komunecon:

la infano estas la respondo al la vivo, al plua evoluo de la mondo, ĝi estas kvazaŭe la praforto de la vivo — la garantio, ke la mondo ne tute ĉesas.

Estas du ĉefaj skurĝoj, kiuj daŭre minacas la vivon:

La unua skurĝo estas la milito, la dua la malsato. Sed la militoj estas nur en niaj manoj. Ĉiu milita agado ne nur detruas aŭ damaĝas la bazon de la ekonomio, de la agrarkulturo, detruas fabrikojn domojn kaj lernejojn, sed ankaŭ malebligas la humanecan evoluon de la homo kaj de la infano. Ofte la infano ekvivas situaciojn, kiujn ĝi ne komprenas. Kruelaj agadoj, mortigoj pere de la plenkreskuloj estas teruraj longefikaj instruoj. Kiu povas nombri la militojn — nun pli multe en Azio-orienta, sudameza Ameriko, aŭ en Afriko: ĉiam estas homoj sub armiloj por liberigi iun de io, kaj tamen nur detruas. Amasoj da

infanoj vivas sub tiu ĉi premo kaj ili estas la rekte trafitaj viktimoj. Sed ankaŭ en Eŭropo ni ekvivas la malestimon antaŭ la vivo. Senkompatate junaj homoj pafmortigas homojn sur publika strato. La gazetoj kaj televidaj sendiloj raportas kaj montras fotojn kun sangaj korpoj. La kruelecoj montritaj en televidaj filmoj efikas kiel veneno: la danĝero por niaj infanoj ja estas, ke ili kutimiĝas al kruelaj agadoj.

La Internacia Jaro de la Infano rezultigu konstantan taskon kaj klopodadon!

Ni instruistoj, pedagogoj, eduku niajn infanojn al humaneca internaciismo, t.e. al internacia interkompreniĝo!

Ni konsciu: Militoj kaj kunlige kun ili la detruado de sociaj kaj ekonomiaj bazoj ne estas evento de iu ekstere, sed la homo mem estas la sola kaŭzo de tiuj detruemoj.

Ni eduku niajn infanojn tiel, ke ili lernu abomeni perforton kaj kruelecojn. Por la paco ne ekzistas alternativo! La infano meritas vivon sen timo.

La alia skurĝo estas la malsato. La statistikoj parolas pri ili en terura kaj kruela lingvo. Sed ekzistas drastaj kontrastoj: krom la bonnutritaj infanoj estas milionoj da infanoj ne nutritaj; kaj kiu jam vidis sur fotoj el regionoj, en kiuj la malsato estas la taga gasto, la kontrastojn, kaj rigardis la ostajn korpojn de la infanoj kun ŝvelintaj ventroj, vidis la enkaviĝintajn grandajn okulojn, devas demandi sin, kiu pri tio respondecas! La fakto estas: la infano de la homo malsatas kaj eĉ mortmalsatiĝas!

Kiu kulpas? La tero? Ĉu ĝi ne plu kapablas, doni la bezonatajn nutraĵojn?

Kiam oni rigardas la mondmapojn kaj konstatas la dezertojn, kiu kalkulas la 4 miliardojn da homoj povus opinii tion. Sed spite kaj malgraŭ la tero ankoraŭ povus nutri ĉiujn:

- sed kie la homo dezertigas la kampojn, mankas la nutro
- kie la homo ne komprenas ĝuste kulturi sian kampon, mankas la nutro
- kie la homo detruas la ekvilibron de la cirkulado inter akvo, aero kaj tero, mankas la nutro

En la Internacia Jaro de la Infano ni ĉiuj devas esti provokitaj batali kontraŭ la malsato kaj finfine venki ĝin:

niaj infanoj havas la rajton esti sataj!

Nia organizaĵo konstante faros ĉion por klerigi niajn infanojn, ke ili en la internacia kunlaboro lernu la principojn laŭ kiuj ili devas trakti sian propran teron: la infanoj estu konstante edukataj ne al la preteksto “oni devus fari ion”, sed al la sinteno por demandi “kion ni povas fari”! ILEI subtenas morale kaj praktike ĉiujn organizojn en la mondo, kiuj batalas kontraŭ malsato.

Alia problemo: Ofte ministroj postulas okaze de la Internacia Jaro de la Infano – infankonvenan lernejon, aliaj kulturportantoj kombinaĵajn lernejojn, aliaj multe pli da infanĝardenoj, aliaj pli bonajn porprofesiajn lernejojn. Ĉiuj tiuj postuloj estas gravaj, ĉar la plej bonaj terapio kaj alternativo kontraŭ milito, malsato kaj mizero, trompo, timo kaj demagogiaj politikoj estas la klera homo, kiu ricevis kiel infano la plej bonan edukadon.

Jen mi pensas pri granda pedagogo el via lando: Johano Heinrich Pestalozzi, kiu naskiĝis la 12-an de januaro 1746 en Zuriko.

Tiu pedagogo komprenis klerigadon kaj edukadon kiel tutecon kaj distingas triecon: kapo – koro – mano.

Sed li celis esence la moraletikan edukadon. Edukado sen trafi la koron, neglektas la tutan homon. Sed virto ne estas instruebla. Pestalozzi demonstris tion en Stanz: la cirkonstancaj malfaciloj estis eksterordinaraj. Stanz suferis ĉiujn teruraĵojn de la milito. Malfido kontraŭ ĉio regadis. Tiuj ĉi obstakloj nur estis venkeblaj per plej granda senmemeco. Li estis siaj infanoj ĉio en ĉio. “Ili estis ekster la mondo, ili estis ekster Stanz, ili estis ĉe mi kaj mi estis ĉe ili, ilia supo estis la mia, ilia trinkaĵo estis la mia. Mi havis nenion, mi ne havis mastrumadon, neniajn amikojn, neniajn servistojn ĉirkaŭ mi, mi nur havis la infanojn.” La morala influo, kiun la infanoj ekspertis, okazis sen multaj vortoj. Li montris, kien eraroj gvidas. Li instruis per sia esto kaj faro, kaj sur ĝi kuŝis la hela brilo de mondsupereca amo.

En la Internacia Jaro de la Infano ni devas ekkoni, ke neniam sufiĉas nur klerigi la kapon kaj manon de la infano; kun aliaj vortoj: ne sufiĉas nur fakscioj, faroj per la mano pere de elegantaj metodoj en supermodernaj lernejoj. La tiel nomata “nur lerneja” aspekto neglektas la moraletikan edukadon. Ĉu ni devas miri, ke ni ellernejigas junulojn, kiuj pli kaj pli fariĝas malemociaj kaj indiferentaj kontraŭ senhelpecoj de la proksimuloj. La egoismo jam naskiĝis en la lernejoj!

Ni iom prilumu la manifeston deklaran fare de UNESKO. La Internacia Jaro de la Infano certe ne nur estas limigita al infanoj, por kiuj jam estas konstruitaj kaj aranĝitaj modernaj lernejoj: en la elementa lernejo estas instruataj objektaĵoj, lingvo, matematiko, arto, tekstillaboroj, religio, sporto, liberaj aktivecoj; kaj en sekvaj lernejoj je pli alta ŝtupo: geografio, historio, socialinstruo, fiziko, ĥemio, fremdaj lingvoj kaj ĉiaj specoj de ŝatokupoj.

Krome la plej multaj lernejoj estas ekipitaj per televidaj aparatoj, vidbendigiloj, filmaparatoj, lumbild projektiloj, sonbendaparatoj, mapoj pri ĉiuj partoj de la mondo, fizikaj aparatoj, sporthaloj, sportplacoj kaj multaj aliaj lerniloj.

Sed restas por infanoj el riĉaj nacioj oftaj senlimaj solecoj, kiel ofte mankas la intima proksimo al la gepatroj, kiel ofte mankas la konfidplena interparolo, kiel ofte nur kompensaj donacoj anstataŭas sindonan simpation. La streĉa labortago lacigas la gepatrojn kaj la senperaj kontaktoj estas pli teoriaj ol praktikaj. Individuaj rilatoj ofte estas malhelpataj per televidaj sendaĵoj: la sportinformoj aŭ la krimaĵoj postulas la atenton.

Nun tamen niajn zorgojn volonte akceptus aliaj popoloj. Kiam ekz. ILEI-delegacio pasintjare vizitis Malagasion por esplori la eblecojn organizi ILEI-konferencon, ĝi ankaŭ informiĝis pri la lerneja situacio: en Tananarivo — la ĉefurbo de la respubliko — ofte la klasoj estas meznombre frekventitaj de 70 ĝis 80 infanoj. La manko de instruistoj estas tia, ke la instru-administracio devigas ekzamenitajn abiturientojn instrui en elementaj lernejoj. Kvankam estas deviga lernejavizito, en multaj regionoj interne de la insulo infanoj ne vizitas lernejojn, ĉar nek ekzistas lernejoj kaj nek instruistoj. La ŝtato alstrebis ĝis 1972 altiĝi la lernejavizitan kvoton al 75%. La prizorgo por la elita intelektularo akcelas pli intensajn klopodojn en formo de diversaj altlernejoj. Tamen, kiu okupiĝas kun klerigpolitiko nepre zorgu por la popolklerigo. Diskrepanco inter intelekta elito kaj malalta nivelo de popolklerigo ĉiam gvidos al politikaj sociaj tensioj.

Sed Malagasio ne estas tipa. Entute estas konstateble ke proksimume la duono de ĉiuj ŝtatoj de la mondo nombras pli ol 50% da analfabetoj precipe en Afriko kaj Azio. Ke la uzino-kolonialismo ekonomie ekspluatas la fakton de neklereco ne povas mirigi (ekz. Honkongo). La nekapablo legi enordigas la homojn al la malmultekostaj laborsklovo, kiuj facile povas esti manipolitaj, t.e. multaj homoj restas sen informoj.

Kiuj la informoj estas, demonstros la suba tabelo:

gazetoj po 1000 loĝantoj

Gabono	0
Kamerunio	4
Haitio	5
Irano	7
Filipinoj	17
Brazilio	32
Fed. Germanujo	326

Ankaŭ statistikaj nombroj kapablas elokvente paroli: de 2,5 miliardoj da homoj (plenkreskuloj) estas ĉirkaŭ 44% analfabetoj, tio respondas al pli ol unu miliardo. Ĉe ĝejunuloj estas la stato ankoraŭ pli akra: 50% de ĉiuj infanoj en la mondo ne povas viziti elementan lernejon.

Ĉiuj, relative ne agrablaj cirkonstancoj en niaj lernejoj sistemoj vaporiĝas al sensignifaj babilaĉoj antaŭ la mizero de milionoj da infanoj.

La moto de nia ekspozicio tekstas:

Ne rasoj, sed ni infanoj vivas en la mondo.

Tiu ĉi moto ne estas arbitre elektita, ĉar ĝi eble belsone eniras en kapon kaj animon, sed la esenco de la moto avertas pri la estonteca evoluado: Rasismo estas la sekvo de neklereco.

Estimo antaŭ la homo restos tiellonge malplena vortingo, kiellonge milionoj da infanoj restos sen lerneja instruado.

Kio pensigas min, estas la fakto, ke la unusola kompetenta mondorganizo Unesco en la jaro de la infano ne debatigas la ŝtatojn pri la situacio de la infano! La rezulto de tiu ĉi debato devus esti granda perspektiva plano, kiu ebligas, ke post kelke da jaroj (eble 5) ne plu estos infano en lernkapabla aĝo, ne komprenante legi kaj skribi. Iu povus demandi, kiu pagos tion? Nun, mi taksas, se oni intencas konstrui elementajn lernejojn por 50% de la infanoj, ni bezonus kelkajn miliardojn da dolaroj, — ereto de elspezoj por armiloj bezonataj estingi en krizaj regionoj patrinojn kaj infanojn plene arbitraj. Momente en la mondo mortas pro militaj agadoj pli da infanoj ol ekz. en Germanio naskiĝas.

La Internacia Jaro de la Infano ne nur estu epizodo, kiun oni finis je la fino de la jaro! La jaro estas averto, la plej grava devo kaj tasko kaj provoko de nia tempo. Ĉiuj infanoj — ĉu en Azio, aŭ en Afriko, ĉu en Sudameriko, — egale kie ili vivas, ili havas la saman rajton je klerigado kiel niaj privilegiitaj infanoj. Nur kiam la homaro entute posedas altan klericon, ĝi venkas la nihilistajn fortojn.

Certe ne estas nur slogano: *Nia sorto dependas de nia klereco!*

ILEI estas laŭ materiaj kaj monaj rimedoj ne riĉa organizaĵo sed sendube de granda moralo. Nia influfero etendiĝas al 41 landoj, kiuj estas troveblaj en ĉiuj kontinentoj. Kiam ni parolas pri infanoj, tiam estas ili ĉiuj por ni samgravaj, samvaloraj kaj samhelpbezona. Pro tio ILEI proponas projekton al kies efektivigo multaj povus kunhelpi. La projekto celas subteni infanojn kiuj laŭ inteligenteco, diligenteco kaj honesteco nepre devus esti helpataj kaj subtenataj. Ni volas akceli infanojn kies vivvojoj estus senesperaj. Tio estas:

1. konkreta helpo al infanoj kaj junuloj, kiuj pro ekonomiaj kaŭzoj ne havas la eblecon sufiĉe kleri sin,
2. ebligi vizitojn kaj partoprenojn de internaciaj renkontiĝoj,
3. instigi, ke tiuj ĉi infanoj lernu la Internacian Lingvon Esperanto.

Kompreneble estas por ILEI la helpo limigita. Tamen estas nia firma decido kontribui al la Internacia Jaro de la Infano ne nur kiel ekzerca devo sed kiel konstanta helpado. La kreskado de nia helpo koincidos kun la prospero de mono donita de homoj kiuj ne pro kompato sed pro sentata morala sindevigo intencos helpi.

Taŭgaj infanoj aŭ junuloj estos nomitaj perhelpo de niaj sekcioj. Ni akceptos ĉiam tiom da infanoj kiom ebligas la disponebla mono. Akceptitaj infanoj restos tiel longe sub la patronaĵo de ILEI ĝis ili estas adoleskaj. La nomo de nia projekto povus esti:

Fondaĵo 1979
Internacia Jaro de la Infano
— I L E I —

Adoptitaj infanoj ricevos de ILEI dokumentojn, kiuj atestos ke ILEI donos ĉiujn helpojn kiujn ĝi povos doni.

Por tuj ekstarti la fondaĵon vi trovos ĉe la pordo liston, en kiu vi jam nun povos asigni monsumon. La prezidanto de ILEI asignos ĉiujn tantiemojn el sia libro "Esperanto, lerneja eksperimento". ILEI ne povas fari ĉion, sed ĉiukaze ion: kaj la ion ni nepre faru!

B. FAKMETODAJ KAJ DIDAKTIKAJ TRAKTAĴOJ.

Resumoj el la 13a Konferenco en Lokarno

Plej alta tajdo en la jara ritmo de ILEI sendube estas ĝiaj Konferencoj. Ĉi-jare ILEI elektis sian konferencan lokon en Lokarno, situanta ĉe la bela Lago Maggiore. La loko estis tiel alloga, ke partoprenis 163 ILEI-anoj el 21 landoj. Kunlige kun ĝia 30-jara konsisto kaj certe ankaŭ pro la tempa kaj distanca proksimo al la UEA-kongreso, multaj gekolegoj uzis la okazon viziti la konferencon kaj fine instigis la partoprenadon la nekompareble favora kotizo, unika por Svislando.

La signifo de konferenco substrekiĝas per siaj altaj personecoj partoprenantaj la inaŭguron. Ĉeestis kiel alta protektanto de la konferenco la direktoro de la eduko-departemento de kantonu Tiĉino, prof-ro Carlo Speziali, s-ro Generali Luigi, prezidanto de la nacia konsilantaro en Berno, la urbestro de Lokarno, s-ro Diego Scacchi, s-ro Massimo Pini, prezidanto de la Granda Konsilantaro, d-ro Tonkin, prezidanto de UEA kaj urbaj oficportantoj.

En siaj salutvortoj, prof. Speziali substrekis la laboron de ILEI favore al pli granda interkompreniĝo. Krom la rektaj salutoj de d-ro Tonkin, alparolis la konferencon reprezentantoj el diversaj landaj sekcioj.

La prezidanto de ILEI, rektoro Sonnabend, prelegis pri la temo "La internacia jaro de la infano — epizodo aŭ averto". Je la fino de la prelego, knabino Cinzia Zanzi malfermis la 13an Internacian ILEI-konferencon "je la nomo de la infanoj de la mondo".

Alia grava evento samtage estis la inaŭguro de la monda ekspozicio — en la kadro de la Internacia Jaro de la Infano. Miltridekkvar infandesegnaĵoj, fotoj kaj pentraĵoj, estis prezentitaj el Aŭstralio, Belgujo, Brazilo, Bulgarujo, Suda Koreujo, Danujo, Finnulo, Francujo, Germanujo, Japanujo, Britujo, Izraelo, Italujo, Jugoslavujo, Nepalo, Nederlando, Polujo, Sanmarino, Hispanujo, Svedujo, Hungarujo kaj Sovetujo — entute 23 landoj.

Sed ILEI-konferencoj havas sian esencon en sia laboro. Prof-ro Szerdahelyi prelegis en la kadro de perfektiga kurso, vendrede kaj sabate.

1. Vendrede.

Li malfermis la kurson kaj enkondukis en la temaron kaj grandtrajte kongis la postulojn por la ekzameno. Sekvis unua prelego el metodologio: "La segmentado kaj organizado de la lingva materialo".

La transformado de la lingva materialo en studmaterialo estas procezo kiu generis didaktikon-metodologion. Ĝi integras operaciojn lingvistikajn, psikologiajn kaj didaktikajn. Nur pedagogo povas ĝin sukcese solvi.

La segmentado de la lingva materialo disvolviĝas laŭ certaj principoj, kiel la demando de la frekvenco (ofteco), de la disponebleco, semantika sistemeco, de la valento ktp. En la morfemika segmento en Esperanto (kaj nur en Esperanto) enestas jam ankaŭ la gramatika segmento, reprezentata por la gramatikaj-funkciaj morfemoj. La organizado de la materialo postulas la konstruon de la tematika-situacia modelo, en kiu jam dislokiĝas ankaŭ la plej dinamikaj, tematike ne enklasigeblaj elementoj. La rezulto de la segmentado kaj organizado estos la minimumo, kiu servos kiel fundamento de la instrufontoj.

2. Sabate.

La Instru-edukaj celadoj de Esperanto kiel lerneja studobjekto.

En la lerneja laboro de la instruisto la instrua kaj eduka aktiveco nedisigeble interplektiĝas. Esperanto posedas specifajn ecojn per kiuj ĝi povas kontribui al la ĝeneralaj celadoj, priskribitaj de la instru edukaj instancoj. Ĝi povas kontribui kaj al edukaj-klerismaj, kaj al didaktikaj kaj al praktikaj celadoj.

La unua — kaj decide grava — eduka celo estas la motivigado de la lernado de Esperanto. Nur tiu lernanto elproprigos la lingvon sur parola nivelo, kiu tion volas! Kiel neŭtrala internacia lingvo, Esperanto estas la sola pere de kiu ni povas eduki niajn infanojn al interhelpemo, interkompreno al vera spirito de internacieco. La klerigan fonon de la internacia lingvo konsistigas ne iu "Landeskunde" ("geografia priskribo") de iu nacia ŝtato kaj etna kulturo, sed ĝi estas en sia karaktero internacia, universala.

La praktika valoro de Esperanto evidentiĝas jam dum la instru-eduka aktiveco mem: Esperanto enigis en la lernejan vivon novan koloron, novajn elementojn.

Aparte estas emfazenda tiu rolo, kiun Esperanto povas ludi kiel propedeŭtika lingvo, kiel pontlingvo inter la gepatra kaj posta fremda lingvo.

La problemoj, kiujn la Esperanto-instruisto devas solvi dum la instru-

ado de Esperanto diferencas laŭ la lokaj cirkonstancoj, laŭ la formo de la instruado, laŭ la aĝo de la lernanto, ktp., kaj precipe laŭ la gepatra lingvo. En la konflikto de la renkontiĝantaj lingvoj (interfero) ekestas fenomenoj, helpantaj alproprigon de la cel-lingvo (pozitiva transfero) kaj malhelpantaj ĝin (negativa transfero). Per kelkaj ekzemploj estis demonstritaj la diverstipaj transferoj, koncernantaj kelkajn diversajn lingvojn.

Samtage alia prelego okupiĝis pri la instrufontoj.

Ĝenerale oni konsideras instrufonto nur la lernolibron. Vere ĝi estas la plej ĝenerale uzata, tamen ĝi estas nur unu elemento de tuta sistemo. La plej grava instrufonto (kaj ekz. en la fonetiko ofte la unusola) estas la persono de la instruisto. La moderna lingvistiko kaj la kibernetiko kontribuis per la principoj de la programado, la moderna tekniko — per aparatoj kaj instalaĵoj, kiuj transformis certajn aparatojn je instrufontoj (aŭda materialo sur magnetofono, vid-efekta sur la diafilmoj).

La instruisto devas transformi la lingvan materialon je kapabloj kaj spertoj de la lernantoj. Tio okazas per koncentra dilatigo de la materialo, per la por ĉiu instruciklo aparte organizata mikro-lingvo, kiu kapablas en si men funkcii, inter siaj modestaj limoj. Ĉar oni instruas la lingvon en ĝia funkcio kaj la funkcio de la lingvo estas la interŝanĝo de informaĵoj, la plej grava kapablo estas la parolo. Sed ĉar ne eblas pli evoluigi iun kapablon per malplifortigo de la aliaj, ĉiuj kapabloj estas disvolvendaj paralele aŭdaj: parolo-kompreno; vidaj: skribo-lego.

La kapabloj elformiĝas dum intensiva ekzercado, plej intensive oni ekzercu la produktivajn kapablojn (parolo-skribo), malpli la receptivajn. La studhoru estu maksimume unulingva kaj parolu kiel eble plej multe da lernantoj en la cellingvo. Por povi mezuri la valoron de iu studhoru, oni faru la sekvan tabelon:

	instruisto	lernanto
gepatra lingvo		
Esperanto		

Oni mezuru la tempon: kiom da minutoj parolis la lernantoj resp. la instruisto en gepatra resp. en Esperanto Tiu horu estus la plej bona, kie plej multe parolis la lernantoj en Esperanto kaj plej malbona, kiam plej

multe parolis la instruisto en gepatra lingvo.

Multe kontribuas al la efikeco de la studhoru la lerte aplikata demonstrado. Ne okazu studhoru sen demonstrado! Ni kreu aplikatajn situaciojn: ni imitu la vivan situacion per konvene elektita demonstrilo, nia parolo estu ĉiam vivproksima, ni kreu tian lingvan atmosferon en la klaso, ke la lernanto kvazaŭ sentu devon paroli Esperanton.

3. dimanĉe Gramatiko.

Szerdahelyi prezentis la diferencon inter la t.n. "gramatiko de la lingvo" kaj gramatiko de la parolo. Poste laŭ niveloj li klarigis la kernajn terminojn, aludante dume al tiuj didaktikaj problemoj, kiuj povas montriĝi dum ilia instruado en la lernejo. Li alvokis la instruistojn pli serioze organizi sian propran perfektigon legante multe pli da fakaj kaj belliteraturaj verkoj. Laŭ la peto de la kursanoj li promesis ellabori proponojn pri "mikro-biblioteko" por pedagogoj.

4. lunde:

Prof. Szerdahelyi konigis detale la postulojn kaj la regularon de Internacia Pedagogia Ekzameno, plue li demonstris per ekzemploj kiel aspektos la diversaj studobjektoj.

Aliaj prelegoj:

D-ro Tazio Carlevaro (sabate) brile prelegis pri "Esperantistoj kaj Esperanto-instruado el la vidpunkto de testologio", vekante la intereson de la ĉeestantoj ankaŭ per la helpo de la diapozitivoj kaj levigante diskuton kaj demandojn, precipe pri la ebleco de testado de la esperantistoj.

S-ino Anja Hurĉak (merkrede) prelegis pri "Komparo inter diverstipaj eksperimentoj en la lerneja ilo-instruado" (Vidu apartan tabelon). Post la pritraktado de la diverstipaj eksperimentoj (Elementa lernejo Oltresavio en Cesena – Italujo; la du internaciaj eksperimentoj de ILEI-Primosteno (Jugoslavio) kaj Saint Gérard (Belgujo); la eksperimenta agado de la Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn-Germanujo), kiuj havis sciencan akompanadon, kiel la eksperimento en somero (Finnlando). S-ino Hurĉak traktis kune kun s-ro Lobin el instituto FeOLL en Paderborn la "paderbornan modelon" kiu okupiĝas pri la lingvoorientata instruado. La enhaviĉa prelego

de s-ino Hurĉak kaj la science bazitaj klarigoj de s-ro Lobin vekis apartan intereson inter la ĉeestantoj kiuj alte taksis la valoran kontribuon de la scienca raporto, kiu celas pruvi ke nuntempe la instruado de ILO ne plu servas nur por alproprigo de la lingvo, sed por oficiala enkonduko kiel instru-fako en la lerneajn programojn.

S-ino Helena Hegedüs (dimanĉe) prelegis pri "La rajto de la infano inter idealo kaj realo". Ekparolante pri la natura sinteno de la infano kiu akceptas volonte la ludadon sed ne rekonas la devon, opiniante havi nur rajtojn, s-ino Hegedüs substrekis la neceson de motivado en la instruado de la Internacia Lingvo konsistanta je alkitimiĝo al la lingvo apud la ludado. La prezento estis tre alloga kaj per la ludado eĉ kun la ĉeestantoj, kiuj "gajnis" poentojn sekve de sukcesa solvo, oni akiras apartan intereson kaj rezulton de la lernado.

La asembleo de ILEI (ĵaŭde, 26.7)

35 delegitoj el 17 sekcioj de ILEI formis la asembleon.

La prezidanto jekomence petis la asembleon stari dum unu minuto je memoro de la forpasinta vicsekretario Gaston Turin.

Li poste raportis pri la trijara laborperiodo de la estraro, kiu montris apartan aktivecon kunvenante du aŭ tri fojojn jare, ĉiam en alia lando kaj laste en Tananarivo (Malagasio).

Dum la pasintaj tri jaroj la Ligo atingis gravajn rezultojn kiel la rekonon fare de Unesko (Kategorio C) kiel internacia ne registara faka organizaĵo, kiu uzas Esperanton laborlingvo, kaj la juran rekonon de la Ligo kunlige kun la leĝa sidejo sur la teritorio de Respubliko Sanmarino. Jen helpis decide la sekiestrino en Sanmarino, prof-ino Marina Michelotti.

Perspektive ILEI alstrebis nun la kategorion B ĉe Unesko.

Fare de la Sveda kaj Dana sekcioj alvenis proponoj por la ŝanĝo de la ILEI-statuto (v. IPR 1/77). Same la estraro pretigis modifan tekston de la statuto, laŭ la spertoj faritaj dum la lastaj jaroj kaj celante malpezigi la strukturon de la Ligo kaj faciligi la funkciadon de la ILEI-organoj.

La prezidanto bedaŭris la neĉeeston de dana delegito kaj proponis formi komisionon, kiu pritraktu la problemon de tri proponitaj statutoj por poste fari analogajn rekomendojn al la asembleo.

Principe povas esti membroj de ILEI: instruistoj, instruantoj kaj simpatiantoj. Celu konstanta de la Ligo devas esti la esploro de edukaj pedagogiaj problemoj. La nuna stato de la komitato ne sufiĉe respondas al demokratiaj

	FINLANDO		ILEI - EKSPERIMENTOJ		PADERBORN-MODELO	CESENA
	I-a REGIONO		II-a REGIONO			
TEMPO-DAŬRO GRADO DE LERNEJO Lernojaroj	3-jara, 6 h/sem. gimnazio 1958/59 - 1962/63	3-jara, 2-3 h/sem. bazaj lernejoj 1971/72 - 1973/74	2-jara, 2h/sem. bazaj lernejoj 1975/76 - 1976/77	2-jara, 2 h/sem. ekde 1975 - daŭriganta	2-jara devege ekde 1973 (daŭriganta)	
Organizaj unuoj AĜO DE LERN.	Kompleta klaso 11-12-jaraĝaj	kompletaj klasoj diversaĝaj: 8-12-jaraĝaj	kompletaj klasoj 8-9-jaraĝaj	libervolaj grupoj 8-9-jaraĝaj	kompletaj klasoj 8-jaraĝaj	
LERNOLIBRO INSTRUISTOJ	"TOM kaj TINA" lerneja instruisto	I. Szerdahelyi: "Esperanto internacia" lernejaj instruistoj	P. Korte: "Sub la verda standardo" lernejaj instruistoj	P. Korte: SUB LA VERDA STANDARDO fakkunlaborantoj de FEOLL-instituto kaj lernejaj instruistoj	aŭdvidaj instruaĵoj elaboritaj en lernejo	
gepatra (j) lingvo (j)	finna	itala hungara bulgara serbo - kroata slovena, (germana)	germana franca nederlanda greka	germana franca pola hungara itala	itala	
Entute: klasoj/ partoprenantoj	1 klaso / ĉ 25	ITALUJO: 4/70 JUGOSLAVIO 11/177 HUNGARUJO: 5/174 BULGARUJO 2/48	Germanujo 3/77 Belgujo 1/16 Nederlando 3/74 Francujo 3/70 Grekujo 3/90	grupoj kun variaj		
Rilate la fremdlingvo- instruado	antaŭ la lernado de la 2 ^a fremdlingvo	a) antaŭ la 1 ^a fremdlingvo b) paralele kun la 1 ^a frem- dlingvo	antaŭ la 1 ^a fremdlingvo	antaŭ la 1 ^a fremdlingvo	antaŭ la 1 ^a fremdlingvo	

Organizanto (Aŭspicio)	lerneja estraro Landa Ministerio	ILEI (Unesco)	ILEI	Eŭropa - Klubo	Itala ILEI-sekcio kun lerneja estraro
Scienca akompanado	Lernejoj Fakuloj	Universitato: Eötvös- Lorant - Budapeŝto Katedro pri interling- vistiko	Diverslanda fakuloj (Germanujo, Belgio, Hunga- rujo, Hindujo, Francujo, Jugoslavio)	FeOLL - Instituto Pri kibernetika peda- gogio-paderborn	Lernejoj Fakuloj
Finanĝo	Internaciaj Renkotiĝoj	Internacia Tendara Lernejo	Internacia Lernejo	Infan-Festoj en Arango de Eŭropa Klubo	Lernejoj Finjaraj Jaraj Arangoj
Pruvendaj Celoj	Lernfacileco, praktika uzebleco ĝenerale kaj en lerneja laboro	Lernfacileco; influo al la lernado de fremdlingvoj; praktika uzebleco	Pli facila lernado de gepatra kaj fremdlingvoj	Lingvo-orientita instruado de ilo en la kadro de kibernetika pedagogio	Lernfacileco uzebleco influo al la lernado de gepatra kaj fremdlingvoj
Rezultoj	Renkomendo de la landa lerneja admin- istracio; ILO-in- struado, kiel la elektebla fremdlingvo por helpi la lernadon de naciaj fremdlingvoj	Responditaj la koncernaj lingvistikaj, didaktikaj kaj psikologiaj demandoj	Pruvita plifaciligado en la lernado de fremdlingvoj lancita la ideo de la	Akiritaj kelkaj bazaj sciencaj rezultoj en la esploroj de kibernetika orientita fremdlingva pe- dagogio la eksperimento daŭrigas kiel parto de EKPIK, respektive de FRUE	ILO kiel konstanta devega instrufako en la lerneja programo

postuloj, tiel la nova proponita ŝlosilo por la elekto de assembleaj membroj favoras ankaŭ la malgrandajn sekciojn kiuj jam por 5 membroj povus havi reprezentanton en la Asembleo.

Por apogi la financan planon, la estraro proponas, ke la abono al IPR estu samtempe membriĝo al ILEI sen pluaj kotizoj; tamen pagante la duonon de la abonkotizo de la revuo oni povos fariĝi membro de ILEI sen IPR-abono. Estas antaŭvidite la starigo de estrarano pri financoj kaj estrarano pri varbado kaj informado.

Unuanime la Asembleo akceptis la proponon nomi komisionon konsistanta el Dora Andersson, Henri Coulon, Catina Giulia Dazzini, One Hoekstra kaj Günter Peek. Sub gvidado de s-ro Hoekstra la komisiono hejme prilaboras la proponojn.

Pro la antaŭvidita internacia konferenco en Malagasio, proponita de la juna energia sekciestro s-ro Raveloson, la prezidanto kaj la ĝenerala sekretario flugis al Tananarivo. Tie ili estis akceptitaj de la ĉefministro kaj havis kontaktojn kun la lokaj esperanto-grupoj kaj kun respondeculo de la edukministerio. Bedaŭrinde en la sekvo la registaro malaprobis la konferencon: eble ili timis la invadon de multaj Esperantistoj, do, kial ĝeni la lingvan solvon per la franca lingvo, sed probable ankaŭ la malakordo inter la malmultaj lokaj Esperantistoj aŭ inter la gvidantoj estas ebla kaŭzo de la malaprobo fare de la Malagasia Registaro.

La propono de niaj maltaj kolegoj konferenci sur la insulo Malto estos ekzamenota.

Direktoro Johano Ingusz raportis pri la lerneja evoluado de Esperanto en la socialismaj landoj:

Germana Demokrata Respubliko: Pagita oficisto pere de la ŝtato, sed praktike Esperanto ne estas instruata en lernejoj kaj ILEI-sekcio estas konsiderata superflua.

Ĉeĥoslovakio kaj Rumanujo ne ekzistas sekcioj de ILEI kaj ĝenerale Esperanto ne estas instruata en la lernejoj.

Bulgarujo: Ne plu ekzistas ILEI-sekcio, sed Esperanto estas vaste instruata en la lernejoj.

En *Jugoslavio* kaj *Pollando* ne nur ekzistas funkciaj sekcioj de ILEI sed oni instruas Esperanton en lernejoj je diversaj gradoj kaj precipe en Pollando oni organizas pedagogiajn kursojn por la gajnado de novaj instruistoj.

Hungarujo: Ekde 1980 Esperanto en mezgradaj lernejoj post libera elekto fariĝos deviga studobjekto.

Komuna resumaro de sciencaj revuoj 1979 1-2

La resumoj estas aŭtentikaj tekstoj skribitaj far la aŭtoroj de la koncernaj originalaj publikaj diverslingvaj. Se mankas post la resumoj sciigo pri tradukisto, la resumoj estas originale verkita en internacia lingvo.

La stato de la klerigiteknologio kaj la pedagogia esplorado en Jugoslavio.

Mužić, Vladimir: *Der Stand der Bildung und der pädagogischen Forschung in Jugoslawien* [La stato de la klerigiteknologio kaj la pedagogia esplorado en Jugoslavio] en: *Kybernetik und Bildung III*, 1977, pp. 113-117.

1. Klerigiteknologio

Klerigiteknologio sen retrokuplo, ekz. radiofonio, televizio, filmoj k.t.p., estas uzata jam dum multaj jaroj, sed oni ankoraŭ ne adekvate esploris ĉiujn eblecojn. Aliflanke la informtransdonado de la lernanto al la informfonto estas evoluigita; granda nombro de respondiloj ja funkcias, sed plejparte nur estas uzata ekzamenecle.

Dum la unua duono de la pasinta jardeko multe disvastiĝis programitaj instrulibroj, kaj tio konsistigis la komenciĝon de la klerigiteknologio kun retrokuplo en Jugoslavio.

Instrumaĵoj de la tielnomata unua generacio neniam trovis aprobon en Jugoslavio, sed nun ŝajnas, ke kalkulilsubtenataj instrumaĵoj ludos gravan rolon precipe en la klerigiteknologio de jugoslavaj altlernejoj.

La akcento momente estas sur diversaj bajtomaĵoj kaj elektronikaj klasĉambroj.

Jen la plej grandaj obstakloj survoje al plia disvastiĝo de klerigiteknologiaj iloj: mankohava instruiteco de la pedagogoj rilate la uzadon de tiuj maŝinoj kaj la inklino de la laikoj ne ĝisfunde elĉerpi la kapablojn de klerigiteknologiaj iloj. Tio kelkfoje havas la efikon, ke novaj instruiloj dum mallonga tempo estas uzataj kun entuziasmo, sed baldaŭ poste estas forgesitaj.

2. Pedagogia esplorado

La klasika aliro al pedagogiaj problemoj en Jugoslavio havas longan historion, sed la empiria esplorado ĝis la fino de la 40-aj jaroj ja estis tre subevoluinta. La empiria esplorado nun jam trapenetris ĉiujn partojn de la jugoslava pedagogio, kaj komputoroj estas aplikataj i.a. por ĝeneralaj

pedagogiaj eksperimentoj, statistika komputorado kaj por reto-planoj de studprogramoj. Nuntempe la plej granda problemo tiudirekte estas, ke mankas sintezo aŭ ligigo de la unuopaj esplordirektoj. La malcentralizado en la sociala evoluo ŝajnis dum la lastaj jaroj nedezirinda centran jugoslavan institucion por pedagogia esplorado; tamen interrespublika servo por informo kaj esplorkunordigado estus tre avantaĝa.

Adreso de la aŭtoro: prof-o d-ro V. Mužić, D. Salaja 3, YU-41000 Zagreb
Esperanto-traduko: Goar Engeländer

Nocio, Kvalitoj kaj apliko de la kleriginkremento kiel mezuro de la lern sukceso.

Frank, Helmar: Begriff, *Eigenschaften und Anwendungen des Bildungsincrements als Maß* des Lernerfolgs. [Nocio, kvalitoj kaj apliko de la kleriginkremento kiel mezuro de la lern sukceso]. En: *GrKG* 18/4, 1977, pp. 105-112.

Se la informenhavo de iu instruado estas I , la daŭro d de ties instruado al lernantoj, kies aĝdependa lernrapideco estas C_v , krome pli-malpli nur dependas de la instrusistemtipo; por samstilo atingi pli grandan laŭprocentan finan scion (kompetentecon) p_t , oni ne kutimas pligrandigi la daŭron $t = d$ alimaniere ol per ripetado de la leciono: $t = 2d, 3d$ ktp. La aĝdependa, absoluta malkoncizeco $\beta^* = d/I$ dividita per la minimuma, ankoraŭ lernebliga malkoncizeco $1/C_v$ estas nomata relativa malkoncizeco β ; ĝi teorie ne plu dependas de la aĝo, kaj karakterizas la instrustilon. Simile al la logaritma dekremento de osciloj, la produkto $\beta\eta$ de β kaj la efikanco η karakterizas kiel „logaritma dekremento de la nescio“, nomata „logaritma kleriginkremento $\ln w$ “, la efikon de la leciono: se ties efiko estas w , la leciono w -onigis ĉiufoje la komencan nescion (t.e. la didaktikan informon \bar{W} difinitan far Weltner aŭ la komplementon $1 - p_0$ de la laŭprocenta antaŭscio p_0). Kaj la logaritma kleriginkremento $\ln w = \beta\eta$, kaj la simpla inkremento $w = e^{\beta\eta}$ mezuras la sukceson de – sen (grava) retrokoplado igita – lernado sendepende de la antaŭscio p_0 .

Kalkulante la (antaŭan resp. finan) kompetentecon p_t ($t = 0$ resp. $t = d$) laŭ

$$p_t = \frac{r_t - z}{1 - z}$$

el la procentaĵo r_t de ĝustaj elektrespondoj hazarde troveblaj laŭ probableco z , evidentiĝas facila aplikebleco de tiuj mezuroj pro sendependeco de z :

$$w =_{df} \frac{1 - p_0}{1 - p_d} = \frac{1 - r_0}{1 - r_d}$$

Tiel troviĝas ekzemple $2,02 \leq w \leq 2,71$ por tri brazilaj televidprogramoj pri elementa geometrio.

Adreso de la aŭtoro: Prof. Dr. Helmar Frank, Rolandsgärten 2, D-4790 Paderborn.

Nova procedo por la solvo de psikometraj problemoj en la analizo de verbalaj datoj

Bierschenk, Bernhard: *Ein neues Verfahren zur Lösung psychometrischer Probleme in der Analyse verbaler Daten* [Nova procedo por la solvo de psikometraj problemoj en la analizo de verbalaj datoj] en: *didakmetrie und soziometrie*, Nr. 20, 1978, p. 1-20.

Pervortaj esprimiĝoj estas analizitaj en la kondut-sciencia esplorado per diversaj metodoj kaj teknikoj. Por priskribi la rilatojn en unu tuta frazo kvante kaj por analizi ĝin helpe de multvariantaj statistikaj procedoj, oni konstruis „ANACONDA“. Tiu mallongigo estas la nomo de metodo por „ANALYSIS of CONcept by means of DATA processing“.

La psikologia modelo, sur kiu baziĝas la metodo, supozas ke empiria observo konsistas el tuta frazo. Krom tio oni supozas, ke ĉiu pervorta esprimo baziĝas sur kognitivaj unuoj („nocioj“), kiuj manifestiĝas per la ŝlosilvortoj de frazo. Plue oni supozas, ke frazo ne estas produkto de strikte hazarda proceso, sed kontraŭe antaŭkondiĉas stokastikan procezon.

La skaligo estis farita helpe de „panelo“. Al la „panelo“ partoprenis 15 kondutsciencistoj de la universitato Lund-Malmö (Svedio). La empiria materialo konsistas el intervjuetekstoj, kiujn oni kondensigis helpe de „klusteranalizo“ kaj faris ilin horrogenaj. La rilatmodelon en la ricevitaj rezultoj oni esploris helpe de diskriminant-analizo. Fine oni provis demonstri la validecon de la metodo.

Adreso de la aŭtoro: Lehrhochschule Malmö, Svedio
Traduko en la Internacian lingvon: Brigitte Frank.

Pri la dedukcio de la lerntempoformulo el la diskreta ALZUDI-modelo.

Hilgers, Rainer: *Zur Deduktion der Lernzeitformel aus dem diskreten ALZUDI-Modell* [Pri la dedukcio de la lerntempoformulo el la diskreta ALZUDI-modelo] en *GrKG* 19/2, 1978, p. 33-34.

La diskreta ALZUDI-modelo fariĝas por la probableco de la sukceso post m paŝoj la formulo

$$p(m) = 1 - (1 - a)^m$$

Ĝis nun oni konkludis al la inverso, ke por atingi la instruelon $!p$ oni bezonas precize

$$w = (1 - a)^{\log(1 - !p)}$$

ripetojn de la instrumaterialo.

En la artikolo la aŭtoro kalkulis la mezan tempodaŭron $E(T_i)$, kiu estas bezonata por fiksita parto i/N de la paralele instruita gelernantogrupo. La amaso N de la gelernantogrupo ĉi tie aperas kiel nova parametro. Oni montras, ke la elspezlaboro estas pli granda ol ĉe la malnova kalkulado, se oni ne celas tro altan lern sukceson,

sed pli malaltan ĉe tre altaj postulvaloroj. La rezulto estas la formulo

$$E(T_i) = \sum_{\mathbb{N}} F_{N, p(m)} (i - 1)$$

$F_{N, p(m)}$ estas la distribufunkcio de la binomiala distribuo por N decidoj kun la sukcesprobableco $p(m)$.

Adreso de la aŭtoro: Dr. R. Hilgers, Erwin-Rommel-Str. 24, D-4790 Paderborn
Traduko en la Internacian Lingvon: Brigitte Frank

Evoluigo de normigita priskriboprocedo por analizo de instrumaterialo.

Schott, Franz; Dierig, Peter: *Entwicklung eines normierten Beschreibungsverfahrens zur Lerhrstoffanalyse* [Evoluigo de normigita priskriboprocedo por analizo de instrumaterialo] en *GrKG* 18/3, 1977, pp. 84-94.

La artikolo pritraktas la demandon, kiamaniere oni analizas precize instrumaterialojn. Koncerna analizprocedo devus esti utila por kelkaj pedagogiaj problemoj, ekzemple por preciza identigado de instruenhavoj, por la analizo de enhavaj strukturoj de instruceloj, por la kvantifikado de instrumaterialoj kaj por la konstruo de instrucelorientitaj testoj. En la unua ĉapitro SCHOTT klarigas la utilon de instrumaterialanalizo per normigita priskriboprocedo. La ekzemploj koncernas jam evoluigitan procedon. En la dua ĉapitro DIERIG donas ellaboritan ekzemplon. Tie nove evoluigita priskriboprocedo estas aplikita.

Adresoj de la aŭtoroj: prof-ro d-ro F. Schott, Otto-Behagelstr. 10,
D-6300 Lahn/Gießen; Dipl.-Psych. P. Dierig, Bertramstr. 73, D-3300 Braunschweig.
Traduko en la internacian lingvon: Institut für Kybernetik.

Anticipa analizo de la kostoj por ĝenerala enkonduko de la lingvo-orientiga instruado, kompare kun hipoteza enkonduko de frua instruado de la angla lingvo, en la ekzempla kazo de Nordrhein-Westfalen.

Lobin, Günter: *Kostenanalyse über die allgemeine Einführung des Sprachorientierung-sunterrichts im Vergleich zu einer hypothetischen Einführung des Frühenglischunterrichts am Beispiel NRW* [Anticipa analizo de la kostoj por ĝenerala enkonduko de la lingvo-orientiga instruado, kompare kun hipoteza enkonduko de frua instruado de la angla lingvo, en la ekzempla kazo de Nordrhein-Westfalen]. En *Europa Dokumentaro* 19, 1978, p. 13-18.

Ekzistas en la Federacia Respubliko Germanio same kiel en aliaj landoj unuflanke spertoj pri instruado de la angla lingvo en la tria kaj kvara lernojaro de la elementa lernejo dum 2 horoj semajne, aliflanke tiaj spertoj pri la lingvo-orientiga instruado. Pere de la unua formo de frua fremdlingvo-instruado eblas instrui la anglan en la 5-a jaro dum 3 (anstataŭ 5) horoj semajne, en la 6-a jaro dum 4 (anstataŭ 5); la dua formo ebligas redukti en la 5-a kaj la 6-a lernojaro la instruadon de la angla al 3 horoj. Se la fremdlingvoinstruado en la elementa lernejo estas libervola kromlernado, eblas kalkuli kun 16% partoprenantaj lernejoj de la 3500 elementaj lernejoj de NRW; tie 25% de la lernantoj partoprenas. Post subtraho de la ŝparotaĵo en la 5-a kaj 6-a lernojaro restus por NRW kostoj de 0,5-0,7 milionoj DM jare, se temas pri la lingvoorientiga instruado, sed de 1,8-2,0 milionoj DM jare en kazo de la elementlerneja instruado de la angla. Se ĉi tiu estus deviga, la kromkostoj en NRW estus 17,7-24,0 milionoj DM jare, sed nur 0,3-6,6 milionoj DM, se temas pri deviga lingvoorientig-instruado.

Adreso de la aŭtoro: Dipl.-Päd. G. Lobin, FEoLL-Institut für Kybernetische Pädagogik,
Pohlweg 55, D-4790 Paderborn.
Traduko de la aŭtoro.

Retotopologio de detaj kombinsistemoj.

Niedereichholz, Christel: *Netzwerktopologie von Informationsverbund-systemen* [Retotopologio de detaj kombinsistemoj] en *GrKG* 19/3, 1978, p. 65-73.

Sciante, ke la softaj ebloj de ĝisnunaj unuopaj sistemoj estas limataj, fabrikantoj kaj aplikantoj de elektronikaj detumaj instalaĵoj estas evoluantaj konceptojn por kombino de komputraj sistemoj, per kiuj realigendas jenaj celoj:

- a) Deta kombino: Pluraj komputroj kuplitaj en reto povas kune uzi detojn kaj programojn.
- b) Interŝanĝo de kapablo: ĉe troŝarĝado de unuopaj sistemoj eblas tempa helpo per maltro ŝarĝitaj komputroj.
- c) Uzo de harto: en kombinsistemo interŝanĝo de laboriloj eblas tiel, ke certaj terminaloj kaj storoj disponeblas por komuna uzo.
- d) Uzo de softo: speciala softo troviĝanta nur ĉe malmultaj partoprenantoj de la reto povas esti uzata de ĉiuj kuplitaj komputraj sistemoj.
- e) Interkomunikado: ebligado de novaj kieloj de komunikado, kiel ekzemple telekonferencoj, instruado helpata komputre.

En tiu-ĉi laboraĵo prezentatas eblaj strukturoj de komputraj retoj (kombinistirsistemo, detotransigsistemo) kaj poste priskribatas modelaj tipoj de jamaj kombinsistemoj.

Adreso de la aŭtorino: Dr. Christel Niedereichholz, Frankenstr. 2, D-6380 Bad Homburg
Traduko: Institut für Kybernetik, Paderborn

Kompara figurigo de la ellebleco de lingvoj.

Kalckhoff, Gerhard: *Eine vergleichende Darstellung der Erlernbarkeit von Sprachen* [Kompara figurigo de la ellebleco de lingvoj] en *GrKG* 19/2, 1978, p. 55-60.

La komparo de ellebleco de lingvoj estas en epoko de pliiĝanta internacia komunikado pli kaj pli gravigenda. Baze de ekzistantaj teoriaj kaj eksperimentaj esploroj pri la atingebla lingvestrado depende de la informenhavo de la lingvo, de la efikanco de la instruado, de la lernrapido kaj de la antaŭscio rezultigis, ke la lernadtempoj de la germana/angla, la itala/rusa kaj Esperanto ĉe sama lingvestrado estas en la raporto de 4:3, 4:1. Kurvoj de la kompetencgrado depende de la lernadtempo ĉe 8- kaj 17-jaraj lernantoj estas figuritaj por la diversaj lingvoj.

Adreso de la aŭtoro: Dr. Gerhard Kalckhoff, Schuckertstr. 14/II, D-8000 München 70
Traduko en la Internacian Lingvon de la aŭtoro.

La vorttrezora antaŭscio pri la I.L. depende de la gepatra lingvo.

Meinhardt, Gerd: *La vorttrezora antaŭscio pri la Internacia Lingvo depende de la gepatra lingvo*, en *Eŭropa Dokumentaro* 18, 1978, p. 13-15.

De franc-, german- kaj nederland-lingvaj infanoj 8-jaraj la pasiva antaŭscio (traduko de fremdaj vortoj en la gepatran lingvon) estas mezurata. La respektivaj rezultoj estas 33,6%, 13,85% kaj 13,1%.

En „pesita“ mezumo - prenu kiel pezojn la relativajn oftecojn de la unuopaj vortoj laŭ Behrmann - la valoroj nur iom malaltiĝas.

Kiel supra baro por al lernotempo bezonata por pasiva lernado de la Korte-vorttrezoro kaj gramatiko ni trovas $t \leq 48,1$ horoj, $t \leq 52,6$ horoj kaj $t \leq 52,7$ horoj.

Adreso de la aŭtoro: Dipl.-Math. G. Meinhardt, FEoLL-Institut für Kybernetische Pädagogik, Pohlweg 55, D-4790 Paderborn.
Originale verkita en la Internacia Lingvo.

Testoteoriaj pripensoj pri la lernmodelo ALZUDI.

Simons, Dirk: *Testtheoretische Überlegungen zum ALZUDI-Lernmodell* [Testoteoriaj pripensoj pri la lernmodelo ALZUDI] en *GrKG* 19/4, 1978, p. 100-104.

La artikolo enhavas kelkajn pripensojn, kiuj estas uzataj en la statistika kvalitkontrolo, ekzemple se oni baze de sampla devas decidi, ĉu la neuzebla parto de iu komercaĵo transiras iun certan procentaĵon.

Ĉi tie oni pritraktas similan demandon, nome kiel oni povas konkludi el granda nombro da gelernantoj, ke la vera lernprobableco a estis pli granda ol supozita lernprobableco a_0 . Rigardo de la testkurboj montras, ke tio ofte ne eblas, malgraŭ ke la vera lernprobableco estas multe pli granda, se oni konsideras la konsekvencojn por la prikalkulado de la lernotempo laŭ la ALZUDI-lernotempo-formulo.

Adreso de la aŭtoro: Prof. Dr. D. Simon, In der Kohldell 62, D-6670 St. Ingbert
Traduko en la Internacian Lingvon: B. Frank

Nuntempaj klopodoj plievoluigi la informpsikologian modelon.

Frank, Helmar: *Derzeitige Bemühungen um Erweiterungen des informations-psychologischen Modells*. [Nuntempaj klopodoj plievoluigi la informpsikologian modelon]. En: *GrKG* 18/3, 1977, pp. 61-72.

Klopodoj plievoluigi la informpsikologian modelon koncernas nuntempe precipe la kvin malfortaĵojn kritikitajn far Hellmuth Walter.

1. La adaptadon de la inteligentec-nocio ebligis Lehl, trovante ĉe plenkreskuloj korelativecojn inter - unuflanke - la tradicie mezurita inteligenteco kaj - aliflanke - kaj la nundaŭro T, kaj la aperceptadrapideco C_k - tiel ke nur 26% de la inteligentec-varianco ne konformas al la varianco de la nunmemoraĵo $K_k = C_k \cdot T$.

2. Al la matematikizebleco de la t.n. „superigo per arigo“ kontribuis Ulrich kaj Walter, mezurante la relativajn asoci-oftecojn p_i resp. P de kvalitoj resp. komunaj kvalitoj de unuopaj nocioj resp. noci-paroj al la koncernaj terminoj. Surbaze de introspekcie evidentebla modelo konkludiĝas la rilato

$$1 - P = [(1 - p_1) \cdot (1 - p_2)]^{\text{ä}}$$

kiu por valoroj de la „logika noci-simileco“ ä inter 0,5 kaj 1 sufiĉe bone priskribas la empiriajn rezultojn de Walter.

3. Informpsikologie priskribeblajn dependecojn de la lernprobablo trovis Frank kaj Meder, laŭ kiuj la lernprobablo por la kompreno de fremdlingvaj vortoj ne similaj al la koncernaj vortoj de la gepatra lingvo estas 0,08 por infanoj okjaraj, kaj 0,37 por plenkreskulo; ambaŭkaze malpligrandiĝas la valoro mezume per la faktoro 0,9^L, se aktiva uzo de vorto de la longeco L estas lernenda.

4. Unua paŝo al matematikizo de motivoj por ebligi ties konsideron far la informpsikologie bazigita kibernetika pedagogio konsistas en difino de „subjektiva efikanco“, kiu respegulas la individuajn variancon de la efikanco pro la diverseco de la atentotempo.

5. Informpsikologia teorio de la fenomenoj de problemsolvado ŝajnas antaŭkondiĉi ties klasifikadon kaj pli precizan difinon.

Adreso de la aŭtoro: Prof. Dr. Helmar Frank, Rolandsgärten 2, D-4790 Paderborn
Resumo originale verkita.

Funkcia komplekseco kaj lernprocedoj.

Kornwachs, Klaus; Von Lucadou, Walter: *Funktionelle Komplexität und Lernprozesse* [Funkcia komplekseco kaj lernprocedoj] en: *GrKG* 19/1, 1978, p. 1-11.

En la artikolo oni montras ke analoge al jam evoluita grado de struktura komplekseco por sistemoj oni povas difini gradon de funkcia komplekseco. La mankan priskribon de kompleksaj sistemoj oni ankaŭ konstatas. Elirante de modifita pragmatika nocio pri informo oni diskutas la necesajn kondiĉojn por lernprocedoj.

Adreso de la aŭtoroj: Dr. K. Kornwachs, Grossmattenweg 18, D-7802 Merzhäusen;
Dr. W. von Lucadou, Hildastr. 64, D-7800 Freiburg
Traduko en la Internacian Lingvon: Yashovardhan

Sistemteknikaj aspektoj rilate la konstruadon kaj la analizon de inform sistemoj.

Focken, Heinz Günther: *Systemtechnische Aspekte beim Aufbau und bei der Analyse von Informationssystemen* [Sistemteknikaj aspektoj rilate la konstruadon kaj la analizon de inform sistemoj] en: *GrKG* 19/2, 1978, p. 44-54.

El la vidpunkto de la sistemtekniko oni ricevas per aroteoria sistemargumento ĝeneralan priskribon de inform sistemoj de diversaj ampleksoj kaj strukturoj. La aroteoria aliĝmaniero aldonas ĝeneralajn principojn kaj regulojn por la pritrakto de inform sistemoj al la sistemtekniko. Per tio eblas oferti sistemteknikajn rimedojn kaj metodojn por la interpretado de certaj sistemkomponentoj. Rezultas superrigardebla prezentado de la sistemstrukturoj. La kunligo de objektaj karakterizajzaj montriĝas kiel komunaj de subaroj. Celorientitajn ordosistemojn por la pritraktenda informo oni povas evolui per procedo por la ordigo de anticikla grafikaĵoj. Laŭ aroteoria interpretado la ordosistemoj kaj la klasifik sistemo estas priskribitaj per aroj de diversaj ŝtupoj. La formalizado de la interligoj kondukas al simpla kompreno de la interligoj ĉe la regajno de informo.

Adreso de la aŭtoro: Dr.-Ing. H. Focken, Schillerstr. 57, D-4780 Lippstadt
Traduko en la Internacian Lingvon: B. Frank

Novaj empiriaj esploroj pri la fidindeco kaj valideco de mezurprocedoj de la aktuala memorilo kiel inteligentekorelato.

Blaha, Lothar; Pater, Walter; Lehl, Siegfried: *Neue empirische Untersuchungen zur Zuverlässigkeit und Gültigkeit von Meßverfahren des Kurzspeichers als Intelligenz-korrelat* [Novaj empiriaj esploroj pri la fidindeco kaj valideco de mezurprocedoj de la aktuala memorilo kiel inteligentekorelato] en: *GrKG* 19/1, 1978, p. 11-18.

Teorie kaj empirie oni povas pruvi proksiman interdependecon inter inteligenteco kaj aktuala memorilo. Ĉar mezurprocedoj por la aktuala memorilo principe mezuras sur pli alta nivelo ol kutimaj inteligentekorelatoj kaj ĉar la nunaj procedoj pri la aktuala memorilo estas pli ekonomiaj, la evoluado valoras. Pro tio entute oni devus havi laŭeble vastajn kaj relevantajn empiriajn eksciojn pri la valideco kaj fidindeco. Ĉi tie oni donas sinoptikon pri novaj validec- kaj fidindec-pruviloj por mezurprocedoj de ambaŭ komponentoj de la aktuala memorilo: de la aktualeco-daŭro kaj de la informo-alfluo al la konscio. Ĉiaj nun prezentitaj rezultoj devus pravigi la normigon de la procedoj per aktuala memorilo por plenkreskuloj, por altigi ilin laŭ la rango de testoj.

Adreso de la aŭtoroj: Dr. med. L. Blaha, cand. med. W. Pater und Dipl.-Psych. S. Lehl Universitäts-Nervenlinik, Schwabachanlage 10, D-8520 Erlagen
Traduko en la Internacian Lingvon: Brigitte Frank

Sovetunio: Post fondiĝo de Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE) la kondiĉoj por Esperanto estas tre pozitivaj. Ĝis nun bonege laboris la du ILEI-sekciestroj Palu kaj Starodubĉev.

La ĝenerala sekretario, d-ro Dazzini, ekkomencis propran raporton pri siaj spertoj koncerne la ILEI-sekciojn, informante ke dum la lastaj tri jaroj oni fondis tri novajn sekciojn: Suda Afriko, Malagasio kaj Venezuelo. Nuntempe ILEI havas 34 sekciojn.

La situacio ĝenerale evoluas favore kaj iom post iom la sekciestroj en la diversaj landoj alproksimiĝas al kontentiga labornivelo kaj fariĝas ĉiam pli diligentaj en la disvolvo de la laboro kaj en la atingo de la statutaj celoj.

La detalajn raportojn pri la diversaj ILEI-sekcioj aperigos la ĝenerala sekretario per aparta cirkulero.

La kasisto de ILEI, S-ro Olle Olsson raportis pri la kasa stato 1978. Laŭ ĝi finiĝis kredit- kaj debetkonto je 34 124,36 kronoj. Kiel bonhavo estas en la banko 22 512,29 kronoj kaj en poŝtĝira konto 801,52 kronoj.

La membroj de ILEI kreskis je 161 al 1171 membroj por 1978.

Por IPR pagis en 1978 entute 421 abonantoj.

S-ro Bertili Andreasson en la nomo de la kontrolkomisiono rekomendis al la asembleo la malŝarĝon de la estraro.

La Asembleo unuanime malŝarĝis la estraron kaj kasiston de ILEI de respondeco por la periodo 1976-1978.

Unuanime la Asembleo aprobis la proponon de la estraro ke pagante 10 guldenojn oni ricevas la revuon kaj oni fariĝas aŭtomate membro de ILEI (kondiĉe ke la abonanto deziras tion) ekde la jaro 1980 kaj oni pagu 5 guldenojn jare por fariĝi membro de ILEI sen revuo (kompreneble la nomita prezo de 10 guldenoj ŝanĝiĝos, kiam ĝenerale la produktaj kostoj altiĝos).

Novelektado de la estraro

La Asembleo voĉdonis unuanime por la 5 kandidatoj kiuj estas elektitaj por la periodo 1980-1982:

Rektoro Helmut Sonnabend (Germanujo) – prezidanto

Direktoro Johano Ingusz (Hungarujo) – vicprezidanto

D-ro Mario Dazzini (Italujo) – ĝenerala sekretario

Prof-ro Francisko Zaragoza Ruiz (Hispanujo) – vicsekretario

S-ro Olle Olsson (Svedujo) – kasisto

Rezolucio

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu okazigis sian 13-an

konferencon de la 19-a ĝis la 27-a de Julio 1979 en Lokarno, dediĉis sian ĉefan atenton al la internacia jaro de la infano. Ĝi elektis la enkondukan temon: *La jaro de la infano – epizodo aŭ averto*.

- La konferenco deziras, ke la Jaro de la Infano ne enviciĝu en la kutiman sekvon de ĝisnunaj proklamitaj jaroj celantaj al iu evento aŭ homgrupo, ĉar tiaj jaroj ĉiam fariĝis statistikaj kaj poste ne sekvis realigoj.
- La konferenco opinias, ke la infano en la socio meritas konstantajn streĉojn kaj zorgojn, por ebligi al ĝi homdignan evoluon.
- Pro tio la konferenco postulas, ke internaciaj tensioj estu solvataj per pacaj rimedoj. Militoj ĉiajspecaj damaĝas aŭ neniigas la vivon de la infanoj kaj detruas la bazon por prospera evoluo de la homaro. La infano meritas vivon sen timo.
- La konferenco konstatas, ke krom naturkatastrofoj, kiuj detruas nutr-aĵojn, ankaŭ la maljusta distribuado de ili kaŭzigas la malsaton de milio-onoj da infanoj.
- La konferenco alvokas ĉiujn respondecajn instancojn fari ĉiujn klopodojn por batali kontraŭ la malsato. Niaj infanoj havas la rajton esti sataj.
- La konferenco estas konvinkita, ke la pli profundaj kaŭzoj de milito, manko de paco kaj malsato kuŝas en la nesufiĉo de klerigado, instruado kaj edukado en la mondo. Milionoj da infanoj en lernkapabla aĝo ne scipovas legi kaj skribi. Kompare al modernaj lernejoj ilia stato signifas grandan diskriminacion. La absoluta manko de minimuma lerneja edukado kaj instruado malhelpas la infanojn al internacia interkompreni-ĝo.
- La konferenco emfaze alvokas ĉiujn ŝtatojn en la mondo zorgi por la infana klerigado. La sorto de la homaro dependas de sia klereco.

C. LA KOREKTA LINGVO.

Jen mikrobiblioteka legendo

Supera Internacia ILEI-ekzameno

Prof.ro Szerdahelyi proponas la jenan mikrobibliotekon por pedagogoj kiuj deziras kandidatiĝi:

Bazaj lerniloj

- 1) Gvidlibro por supera ekzameno. Budapest 1979
- 2) La verko de P.Janton aperinta en Esperanta originalo kaj Germana kaj Hispana tradukoj.

Interlingvistiko

- 3) Stojan, P.E., Bibliografio de Internacia Lingvo. Hildesheim 1973
- 4) Dresen, E., Historio de la Mondolingvo. Oosaka 1967, 240 p.

Historio

- 5) Lapenna, I. k.a. Esperanto en perspektivo. Rotterdam 1974, 876 p.
- 6) Zamenhof L.L., Fundamenta Krestomatio. Paris
- 7) Zamenhof L.L., Leteroj. Helsinki 1975, 329 p.
- 8) Zamenhof L.L., Paroladoj. Tokio 1973, 80 p.

Gramatiko

- 9) Kalocsay, K., Waringhien G., Plena gramatiko de Esperanto
- 10) Wells, J.C., Lingvistikaj aspektoj de E-o. Rotterdam 1978, 76 p.

Literaturo

- 11) Diego, F.de, Pri Esperanta Tradukarto. Saarbrucken 1979
- 12) Auld, W., Enkouduko en la originalan literaturon de Esperanto, Saarbrucken 1979, 101 p.

Metodologio

- 13) Szerdahelyi I., Metodologio de Esperanto. Budapost 1975, 377 p.
- 14) Rakusa, R., Metodiko de Esperanto

Vortaro

- 15) Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, Paris 1977, 1336 p.
aŭ: Plena Vortaro de Esperanto. Paris 1971, 573 p.

Interlingvistiko

- 16) Szerdahelyi I., Interlingvistiko historia kaj kompara. 2 Vol.oj, po ĉ. 500 p.
Antaŭmendebila ĉe Stafeto/TK, Heideweg 20, B-2120, Schoten (Belgio)
- 17) Couturat, L. Leau, L., Histoire de la langue universelle + Les Nouvelles langues internationales (Paris 1907) Hildesheim 1979, 724 p.

Historio

- 18) Holzhaus, A., Doktoro kaj lingvo Esperanto. Helsinki 1969, 524 p.
- 19) Privat, E., Historio de la lingvo Esperanto Leipzig 1927, 199 p.
- 20) Carlevaro, T., Socipsikologio kaj grupdinamiko de Esperanto movado La Cahus-de-Fonds

Gramatiko

- 21) Zamenhof, L.L., Lingvaj respondoj. Marmande, 1962
- 22) Zamenhof, Fundamento de Esperanto. Marmande, 1963
- 23) Varankin, V., Teorio de Esperanto. Saarbrücken 1977, 67 p.
- 24) Neergard, P., La osperantologio kaj ties disciplinoj Kopenhago (1943) Represo. Saarbrücken, 1979
- 25) Piron, C., Esperanto: ĉu Eŭropa aŭ azia lingvo? Rotterdam 1977, 32 p.
- 26) Wüster, E., Esperantologiaj studoj. Antverpeno. La Laguno 1978, 254 p.
- 27) Szerdahelyi, I., Skizo pri morfemiko de Esperanto. Budapeŝto

Literaturo

- 28) Kalocsay K. k.a., Parnasa gvidlibro. Warszawa 1968, 157 p.
- 29) Rossetti, R., Spegulo de Esperantaj stiloj. Lelystand 1976, 16 p.
- 30) Diego, F. de, La Esperanta traduk-arto. SEL (1979)

Ĉ. REKOMENDITAJ LIBROJ.

Neŭtrala verko de neŭtrala Ligo

István Szerdahelyi

Helmut Sonnabend, *Esperanto: lerneja eksperimento -raporto, -analizo, -konkludo*. El la dokumentaro de ILEI, Centra Eŭropo dua regiono. Serio: Kajeroj de Internacia Pedagogia Revuo n-ro 1. Edistudio, Pisa, 1979.

"Esperantistoj devus sekvi sciencan metodon kaj el faktaj eksperimentoj detiri teoriojn, sed neniam ni devus, kiel ofte okazis, peni realigi nematurajn ideojn."

El la parolado de H. Hodler, Krakavo, 1912.

Ĉu tiuj vortoj de la elstara organizanto dum la postsekvaj preskaŭ 70 jaroj eksmodiĝis?

La recenzata verko respondas al tiu demando. En ĝi akumuliĝas miloj da laborhoroj: tempo kaj energio, sen kia ajn rekompenco, fontantaj el sincera kaj honesta pedagogia konscio kaj serena optimismo, ke tiu investado ne estas vana, kaj iam (la rezulto de la pedagoga laboro efektiviĝas ĉiam estonte) – do iam tiu investaĵo realiĝos kiel socia forto, produkto, aktiveco.

Per tiu ĉi verko komenciĝas jam delonge atendata serio: *la biblioteko de pedagogoj* – sed ne nur. Ĉiu, kiu serioze konsideras la estontecon de la internacia lingvo, devas nepre posedi tiun ĉi verkon (kaj – mi esperas – ankaŭ la sekvajn). Ĉu povas esti serioza esperantisto indiferenta rilate al la problemaro de la lerneja instruado de Esperanto? Ĉu ekzistas esperantisto kiu kontestas la gravecon de tiu laboro koncerne la estontecon de la internacia lingvo? Kaj la verko prezentas *faktojn*: demonstros, analizas kaj konkludas. Mi ripetas: faktojn. Ne sloganojn, ne devizojn, sed mezuritajn faktojn. Kaj la hodiaŭan homon nur la faktoj konvinkas. Jen ĝia propaganda aŭ pli konvene: informa valoro, jen kial devas ĝin posedi ne nur ĉiu esperantista pedagogo, sed ĉiu esperantisto.

Mi ne entreprenas la prezenton de la verko: tiaspecan monografion estas ege malfacile prezenti per kelkaj vortoj. Oni devas ĝin trastudi. Sed frapis min difino sur la p. 126: la vortoj de iu s-ro *Rimkeit*: “*Neŭtrala lingvo signifas por la didaktika elektdecido: sen kultura fono.*” Kiom ajn stulte ĝi sonu ĝi tuj veriĝas, se ni aldonas nur unu solan vorton jene: *sen naci-kultura fono*. Jes: “lingvo, *sen nacia-kultura fono*”.

Cetere per tio la aŭtoro tuŝas problemon hodiaŭ tre diligente diskutatan kaj ofte rilatatan ankaŭ al ILEI. La Ligo de pedagogoj troviĝas nun en la kruc-fajro de du divers-direktaj akuzoj: laŭ unu – ĝi estas *ne-neŭtrala*, laŭ alia – ĝi estas *tro-neŭtrala*.

Por vidi klare oni devas kompreni: kion signifas neŭtraleco kaj due: kio estas ILEI.

1.1. *Neŭtrala* – laŭ PIV-difino signifas: “*Ne partoprenanta, nek volanta partopreni en diskuto, batalo, milito...*” El tiu difino sekvas, ke la vorto sociigas sintenon de iu tria rilate al du diskutantaj, batalantaj, militantaj partioj. Dume: *neŭtra* – laŭ la sama fonto – signifas: “*Tia, ke ĝi apartenas nek al unu, nek al alia el du kategorioj.*” La diferencon inter la du nocioj mi vidas en tio, ke: en la unua temas pri *partopreno*, en la dua pri *aparteno*, *due*: en la unua la sinteno rilatas al iu *konflikto*, en la dua – al simpla *stato*.

1.2. Ŝajne, nek la neŭtraleco, nek la neŭtreco estas ideologio, sed, kiel jam dirite – nur *sinteno* pli ĝuste: sindeteno.

1.3. *La nepolitikaj internaciaj organizaĵoj* fondiĝas pro iu komuna intereso, koncernanta egalmesure ĉiujn siajn membrojn, sendepende de tio, ĉu unu aŭ la alia membro apartenas al iu aŭ alia politika flanko aŭ ne. La internaciaj organizaĵoj de fervojoj, de la poŝto, aŭ de la literaturistoj (la t.n. Internacia PEN-Klubo) ekestis ne laŭ iu politika koncepto aŭ intereso, nek el iu mondkoncepta motivo: ĉiuj membroj estas egale interesataj pri ilia ekzisto kaj normala funkciado, do ĉiuj memvole submetiĝas al tiuj principoj, kiuj certigas tiun normalan funkciadon. Sen la normala funkciado de UPU (Universala Posta Unuiĝo) aŭ de la absolute kunordigita funkciado de la internacia fervoj-retaro estas neimagebla la hodiaŭa vivo. La komunaj interesoj superas la unuopajn interesojn. La karaktero de tiuj mond-organizaĵoj restos ĉiam la sama kaj tute sendependa de la konsisto de ilia estraro.

1.4. Modela internacia organizaĵo estas la *Internacia Ruĝa Kruco* (Ruĝa Duonluno, Ruĝa Leono). Ne ekzistas peceto en la mondo, kie ĝi ne funkcias. Ĉiuj landaj organizaĵoj estas memstaraj: la centra organo ne estas gvida, nur reprezentata. Obeante la samajn principojn, la landaj organizaĵoj funkcias aŭtonome, ĉiu laŭ siaj specifaj lokaj cirkonstancoj.

2. ILEI similas al tiuj organizaĵoj: ĝi ekestis pro la komuna intereso de la esperantistaj pedagogoj. ILEI reprezentas kunordigitan forton de la esperantista instruistaro. Ĝiaj membroj havas du komunajn karakterizilojn: ili ĉiuj estas *esperantistoj* kaj ili ĉiuj estas *pedagogoj*. Iliaj ceteraj karakteriziloj (kiujn ili tutcerte posedas) restas ekster ilia ILEI-membreco. Kiel faka-profesia organizaĵo ILEI havas siajn specifajn celojn, taskojn, metodojn. La ĉefa agadsfero de ILEI estas la lernejo, la lerneja politiko: *unuflanke* ĝi estas vasta klubo de diversfakaj kaj divergradaj esperantistaj pedagogoj, *aliflanke* ĝi antaŭpreparas kaj gvidas la kampanjon, kies fina celo estas la oficialigo de Esperanto kiel lerneja studobjekto. Ĉi lasta celo estas tiom grava, tiom kompleksa kaj tiom malfacila, ke ILEI sola, sen la helpo de ceteraj Esperantistaj organizaĵoj kaj unuopuloj ne kapablos ĝin solvi. Sed neniu Esperantista organizaĵo kapablos solvi ĉi tiun taskon kaj atingi ĉi tiun celon *sen ILEI*, des malpli *kontraŭ ILEI*!

2.1. Se ni rigardas tra tia optiko la recenzatan verkon, estas neeble ne konscii, kiom grava, kiom serioza kaj sobra estas la aktiveco de la Ligo. Se mi aldonas, ke la ILEI-Konferencoj kaj Seminarioj (vd. ĉi-lastan, aranĝitan en Sorbono) reprezentas la saman koncepton, havas la saman etoson kaj direktiĝas al la sama celo, tiam ĉiu honesta esperantista pedagogo devas senti moralan devon aliĝi al tiu laboro, kontribui al ĝi per siaj fortoj, ebloj kaj kapabloj. Ju pli forta, vasta kaj aŭtoritata estus la Ligo de Esperantistaj Pedagogoj, des pli ni povus esperi pri la sukceso de nia lerneja politiko, al kio tre valora kontribuado estas ankaŭ la prezentata verko.

14a Konferenco en Malto

La konferencanoj loĝos, manĝos kaj laboros en la sama kolegio kie ekzistas unulitaj ĉambroj kaj multaj dudeklitaj ĉambroj. Ĉiu partoprenanto ricevos littukojn, mantukon kaj vestapogilojn en la ŝranko. Ekzistas modernaj servoj en la kolegio: lavejoj kaj duŝejoj. Dum la konferenco funkcios trinkejo kie oni povos ricevi varmajn kaj malvarmajn trinkaĵojn je malalta prezo.

La kondiĉoj: Kompleta pensio (matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo) sen trinkaĵoj, en unulita ĉambro 65 Maltaj Liroj por 9 tagoj po persono – en dudeklitaj ĉambroj 55 Maltaj Liroj por 9 tagoj po persone), de la vespermanĝo de la 24-a/7 ĝis la tagmanĝo de la 2-a/8/1980.

La inaŭguro okazos en “Dar Il Mediterran” (Mediterranea Konferencoj-Centro)-Valletta, en la antikva mirinda Palaco de la Kavaliroj de Malto. La inaŭguro okazos Vendrede, la 25-an de Julio 1980-a je la 18-a h.

Konstanta adreso de la Konferenco: *Carmel Mallia – 89 Sanctuary Str. -Zabbar -Malta* – Tel. 882381 – Bonvolu telefoni dum la labortagoj de la 17,30 ĝis la 22 h. – Aliĝilon kaj monon oni devos sendi al la supredirita adreso, per poŝt-aŭ bankĉeko internacia.

Estante la nombro de la unulitaj ĉambroj limigita kaj ne ekzistante dultitaj ĉambroj, oni konsilas aliĝi tuj se oni ne volas dormi en dudeklitaj ĉambroj. La LKK intertempe estas esploranta la eblecon ricevi pliajn unulitajn ĉambrojn en apuda kolegio, 350 mt. malproksima de la konferencejo.

La provizora programo de la konferenco antaŭvidas prelegojn pri la Malta Lingvo, pri la pratemplaj de Malta, pri la ĉefa temo de la konferenco kaj pri la internacia jaro de la kriplulo, pri prezentado de nova literatura verko, pri organizaj problemoj de I.L.E.I.-sekcioj. Okazos kiel kutime lecionoj pri Esperanto por komencantoj, progresintoj kaj konversacia kurso.

La kultura aranĝo antaŭvidas la viziton de la hipogeo de Hal-Salfieni, unika en la mondo, kaj de la pratemplaj de Hagar Qim, Mnajara kaj Tarxien. Oni vizitos ankaŭ la malnovan ĉefurbon de Malta, Mdina; la romian vilaon de Rabat kaj la novan ĉefurbon de Malta, La Valletta. Membro de la organiza loka komitato akompanos la konferencanojn kaj klarigos esperantlingve la vidindaĵojn.

Dum la konferenco okazos kontaktoj kaj ronda tablo kun reprezentantoj de la edukinstancoj de la kulturministerio kaj de la sindikatoj.

Estas antaŭvidita solena ekumena diservo kaj sekvos por la katolikoj sankta meso en Esperanto.

Estro de la novfondita I.L.E.I.-sekcio: Anthony Mercieca, 20 Valletta Road, Qormi-Malta

Statistiko 1979

Membroj en ILEI kaj abonantoj de IPR 18.7.1979

	1976	1977	1978	1979	1977	1978	1979
1. Aŭstralio			1			1	
2. Aŭstrujo	36	38	41	35	16	14	12
3. Belgujo	30	25	25	35	1	6	8
4. Brazilo	6	6	40		4	11	
5. Britujo	127	131	134		90		
6. Bulgarujo	–	–	–	–	–	–	–
7. Danlando	45	35	25		30	31	
8. Finnlando	39	30	46		20	27	27
9. Francujo	200	195	175	190	43	46	37
10. Germanujo	200	100	100	31		24	32
11. Grekujo	–	–	10	10			2
12. Hispanujo	25	25	35		12	3	
13. Hungarujo	26	25	–				
14. Islando	8	14	–				

15. Israelo	—	7	—				
16. Italujo	115	80	166		80	115	
17. Japanujo	8	8	—		2	2	1
18. Jugoslavio	30	5	5	25			20
19. Kubo	6	6	6				
20. Luksemburgo			5	5		1	
21. Malagasa Resp.		1	5				
22. Nederlando	65	62	65	75	30	65	75
23. Norvegujo	45	50	54	62	10	13	
24. Nov-Zelando			18			1	
25. Pollando			31	31		31	31
26. Sanmarino	5	5	5	5	2		
27. Sovet-Unio			10				
28. Sud-Afriko			6	9		5	9
29. Svedujo	54	52	51		8	11	7
30. Svislando		4	7		10	10	
31. Usono	105	106	105	99		10	10
32. Venezuelo				7			
	1173	1010	1171	619	358	421	271

E. DOKUMENTOJ.

Rilatoj inter malagasio kaj ILEI

La delegitoj de la 13-a konferenco en Lokarno aprobis la proponon de la estraro de ILEI venontjare (1980) konferenci sur la mediteranea insulo Malto (sendependa ŝtato, ano de la Brita Konfederacio) (vidu la raporton de la ĝenerala sekretario!). Antaŭvidita estis Antananarivo, ĉefurbo de la Demokrata Respubliko Malagasio kaj la aŭguroj aspektis favoraj:

1. Surbaze de la invito de s-ro Raveloson la prezidanto kaj la ĝenerala sekretario vizitis la ĉefurbon,
2. fondis ŝtate rekonitan ILEI-sekcion,
3. havis viglan kontakton kun lokaj Esperanto reprezentantoj,
4. traktis bonegajn kondiĉojn kun la malagasia flugkompanio,
5. estis afable akceptita fare de la Ministroprezidento, kaj aliaj ŝtataj instancoj,
6. jam ekzamenis la bonajn loĝ- kaj laboreblecojn en la hotelo Hilton,
7. kaj havis bonan eĥon en la gazetaro.

En la sekvo konstatu la iradon laŭ la leteraj dokumentoj:

1. letero al la Ministroprezidanto (mankas la akcesoraĵoj):

Alparolo

17.4. 978

Okaze de la tre afabla akcepto ĉe vi profunde impresis nin via komprenemo kaj ĝentileco. Via bonvolemo kuraĝigas nin, novigi nian peton al vi transpreni la altan patronecon de nia konferenco en 1980. Tiucele ni skribis al la Ministro pri Eksteraj Aferoj.

[subskribo]

2. letero al la Ministro pri Eksteraj Aferoj:

Alparolo

17.4.1978

Kiel vi povas konstati el la ĉemetitaj dokumentoj nia organizado planas konferenci en via ĉefurbo. La temo de konferenco: "Esperanto por la edukado de afrikaj infanoj" povus kontribui al internacia interkompreniĝo.

Ni petis la sinjoron ĉefministron transpreni la altan patronecon pri nia konferenco.

Bonvolu esti konforma al nia deziro.

[subskribo]

3. letero de la Ministro pri Eksteraj Aferoj al la prezidanto de ILEI:

Alparolo

25.8.1978

Mi havas la honoron respondi al via letero de la 17-a de Aprilo 1978 kaj informi vin, ke mia registaro ne favoras vian proponon okazigi en Antananarivo la konferencon laŭ la indikita temo kaj ankaŭ en jenaj punktoj:

aplikado de internacia eksperimento por instrui Esperanton en klasoj de establita lernado en Malagasio,
partopreno de la Malagasia Ŝtato en la konferenco planita de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en Antananarivo en 1980.

Mi petas vin akcepti....

[Subskribo]

4. letero al la Ministro pri Eksteraj Aferoj

Alparolo

7.11.1978

Mi konfirmas la ricevon de via letero je la 25-a de Aŭgusto 1978 kaj dankas vin pro la sciigita opinio de via registaro.

Probable ekzistas miskompreno pri niaj intencoj en via registaro.

La 1-an de Aprilo 1978 la estraro de ILEI havis la honoron esti akceptita far de la Ministroprezidanto, sinjoro Rakotoarijaona Désiré.

Interalie ni submetis du demandojn:

1. Ĉu la ŝtato donos la aprobon, ke ni organizu ILEI-konferencon dum 1980 de la 18-a ĝis la 28-a de Julio?

2. Ĉu la Ministro-prezidento estos preta akcepti la altan patronecon? La sinjoro Ministro-prezidento ekkonigis sian simpatian al niaj deziroj. Entute ne temis pri partopreno far de la ŝtato.

Mi afable petas vin, sinjoro ministro, rekonsideri vian respondon de la 25-a de Aŭgusto 1978 kaj pozitive decidi, kaj anticipas, ke la *Republika Demokratika Malagasy* ne intencos malpermesi al la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj konferenci en via lando.

Bonvoli...

[subskribo]

5. Letero de la Ministro pri Eksteraj Aferoj al la prezidanto de ILEI

15.3.1979

Alparolo

Mi havas la honoron rilate vian leteron de 7.11.1978 sciigi al vi, ke la Demokrata Respubliko de Malagasio pro konsidero de la prioritatoj devas establi sistemon de fremdlingva sekvo kaj ne povas favori vian konferencon en Antananarivo.

Mi petas vin...

[Subskribo]

Pro tio ĉi, la Ligo decidis ŝanĝi la lokon de sia 14a Konferenco de Antananarivo al Malto.

Opinio kaj propono.

Hans Fechner

Estimata Kolego,

hodiaŭ mi ricevis la numeron 1/1979 de IPR. Mi jam de longe (t.e. jam de jaroj) ne legis Esperantaĵojn, pro diversaj motivoj kaj kaŭzoj; tamen hodiaŭ mi havis emon kaj tempon por tralegi la kajeron. Mi bedaŭras, ke mi ne havas kontakton kun iu ajn kolego ie en la mondo pere de Esperanto, kaj speciale en mia fako 'speciala edukado' (Lernbehindertenschule – lernejo pro lernmalhelpataj infanoj). Vizito de kongresoj ne eblas. Pro tio ekiĝis en mi demando al redaktisto de IPR: Ĉu eblas, ke vi enmetu en IPR-n rubrikon, en kiu oni povas serĉi kontaktojn, anonci projektojn, ktp. Precipe en mia fako ni orientiĝas preskaŭ nur je la angla literaturo, sed neniel influas nin – aŭ eble nur peritaj laŭ kelkaj lingvaj kaj tempaj kromvojoj – ekzemple la orientaj atingoj, metodoj kaj spertoj. Do, mi prezentas al vi mian proponon kaj volonte havus 'retrokladon' (tiun tradukon mi hodiaŭ lernis el IPR) de vi.

KUNLABORANTOJ POR IPR SERĈATAJ !

Kiuj gekolegoj deziras kunlabori en la pretigado de IPR?
La unika ŝanco de nia revuo kuŝas en ĝia plena, totala inter-
nacieco.

Skribu al mi kaj samtempe kontribuu

1. per via ideoj, kaj
2. per ĉiaspecaj enhavaĵoj.

Helmut Sonnabend.

Sekciestroj de la Ligo

Aŭstralujo:	prof. Ivan Th. Maddern, Box 411, Morwell, Victoria 3840.
Aŭstrujo:	Ernst Rixner, Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno.
Belujo:	E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal.
Brazilo:	Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.
Britujo:	Hilary Chapman, 7 fairacre road, Barwell, Leicester LE9 8HH.
Bulgarujo:	Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia.
Danujo:	Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo:	Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Francujo:	Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
F.R.Germanujo:	F.R. Hermann Behrmann, Grunigerstr. 5, D-4790 Paderborn.
Grekujo:	Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Ateno (816).
Hispanujo:	prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
Hungarujo:	Zsuzsa Bacsay, PF 139, H-1368 Budapeŝto.
Islando:	Baldur Ragnarsson, sogavegur 170, Reykjavík.
Israelo:	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv.
Italujo:	d-ro Catina G. Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa – pĉk. 22/2883.
Japanujo:	Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
Jugoslavujo:	d-ro Miodgrad Stojanoviĉ, Duruntorska ul.2/iv-32, YU-11000 Beograd.
Luksemburgo:	Robert Hoegener, 4 rue des charbons, Esch/Alzette.
Kanado:	vidu Nordameriko.
Kolombujo:	prof. Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin.
Koreujo:	–
Malagasujo:	prof. Eugene Raveloson, BP 127, Tananarive.
Nederlando:	Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl.
Nordameriko:	John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266.
Norvegujo:	Margrete Landmark, Universitet i Oslo, Psykologisk Institutt, Postboks 1094, Blindern, Oslo 3.
Nov-Zelando:	Gwenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt.
Polujo:	–
Rumanujo:	–
Sanmarino:	prof. Marina Michelotti, via xxv marzo 73, I-43031 Rep. San Marino.
Sovet-unio:	Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV. Nikolaj Starodubĉev, poŝtrestante, SU-340047 Doneck.
Svedujo:	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund.
Svisujo:	Olivier Tzaut, CH-2610 Mont-Soleil.
Usono:	vidu Nordameriko.

Izolitaj membroj

Ĉeĥoslovakujo:	Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Píbram.
Germana D.R.:	d-ro Till Dahlenburg, Str. d. DSF 13, DDR-2722 Brüel.
Irano:	M. Saghafian, ŝiras ave., Emdadi st. 22, Vanak, Teheran 19.
Jemena P.D.R.:	d-ro Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh hospital, Khormaksar, Aden.
Kubo:	Pedro Pablo Lamas Díaz, apartado 223, Ciego de Avila.
Singapuro:	Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunios Crescent, Singapuro 14.
Zairujo:	Antoine-Samuel Ngangu, BP 13, Lukala, Nkandu.

ESTRARO DE ILEI

prezidanto	rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, F. R. Germanujo
vicprezidanto	direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapest X, Hungarujo
sekretario	d-ro prof. Mario Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, Italujo
vicsekretario	prof. Francisko Zaragoza Ruíz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo
kasisto	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

KUNLABORANTAJ ORGANIZOJ

FIMEM	Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda
UEA	Universala Esperanto-Asocio
Unesko	Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj

*la kanto - lumbro + per laboro - sininstruon
Kaj spuro de la pura parolo de ambiano
Kantoj*

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO – IPR

organo de

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI
en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

aperas trifoje jare

redaktas – Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, FRG

poŝtĝirkonto – Stockholm 682-117-7 ILEI, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

jarabono – 20 svedaj kronoj

la abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI

nemembroj de ILEI pagu al la supre indikita poŝtĝirkonto